



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 173

Septembro 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



Neniu el la halifaksa regiono ĉeestis la ĉi-jaran Universalan Kongreson de Esperanto en Tel-Avivo, Israelo. Tamen, ni ĉiuj povas kvazaŭ-ĉeesti aŭskultante al sondokumentoj kiel ĉi tiu registrita de Radio Polonia. Rekte antaŭ la inaŭguro de la 85-a UK, la 26-an de julio 2000, venis la mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan, kiun en la simultana traduko el la angla prezentis Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo de UEA.

SALUT-MESAĜO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ AL LA 85-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Estas al mi granda plezuro transdoni miajn plej varmajn dezirojn al la 85-a Universala Kongreso de Esperanto. La komenco de nova jarmilo prezentas unikan okazon por pripensi nian komunan sorton en momento kiam ni trovas nin pli interkonektitaj ol iam ajn antaŭe. La avantaĝoj de tutmondiĝo estas evidentaj: pli rapida kresko, pli alta vivnivelo, novaj ŝancoj. Tamen, ankaŭ la rebato jam venis ĉar tiuj avantaĝoj estas tiel malegale distribuitaj, kaj ĉar la tutmonda merkato ankoraŭ ne baziĝas sur reguloj pri komune dividitaj sociaj celoj. La ĉefa rolo de Unuiĝintaj Nacioj en la nova tutmonda erao devenas el niaj universalaj membraro kaj celo, kaj el la komune dividitaj valoroj enkorpigita en nia Ĉarto. Estas nia tasko certigi ke tiu tutmondiĝo provizos avantaĝojn ne nur por kelkaj sed por ĉiuj; ke paco kaj sekureco estos ne nur por malmultaj sed por multaj; ke ŝancoj ekzistas ne nur por la privilegiitoj sed por ĉiu homo ĉie. Pli ol antaŭe, Unuiĝintaj Nacioj estas bezonata esti ponto inter diferencoj de ŝtatoj koncerne potencon, kulturon, grandecon kaj interesojn, servante kiel loko kie la afero de nia komuna homeco estas esprimata kaj antaŭenigata.

Kiam vi konvenas en Tel Avivo, memoru ke ĉiu el ni povas fari ion por fari nian mondon pli bona loko, kaj ĉiu el ni havas la devon ĝis maksimumo utiligi siajn ŝancojn. Unuiĝintaj Nacioj povas krei ŝancojn, sed ĝi ne povas devigi vin uzi ilin. Ĝi povas teni pacon, sed ĝi ne povas devigi vin brakumi ĝin. Ĝi povas helpi identigi padon al evoluo, sed ĝi ne povas sola veturi laŭ ĝi. Estas via tasko, popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, kapti la momenton, fari vian plejmulton por plejmultaj koncerne la ŝancojn tiu ĉi nova erao prezentas. *En tiu spirito mi deziras al vi plenan sukceson.*

— Kofi Annan


Redaktora rimarko: La originalan elparolon de ĉi tiu dokumento oni povas iam ajn aŭdi pere de "Esperanta Retradio", sonarkivo de programeroj el la Esperanta Redakcio de Radio Polonia kiujn kolektas kaj enretigas la aŭstrian Anton Oberndorfer. Oni povas trovi ĉi tiun valorplenan sonarkivon ĉe la ret-adreso: <http://start.at/retradio>.

VORTLUDO


Dank' al Marjorie Boulton

Frue en septembro komenciĝas nova lernejo-jaro en Nova Skotio kaj ĉie en Kanado. Por tiuj, kiuj ankoraŭ memoras la proprajn spertojn en lernejo, jen kvizo por ekzerci la scion pri bestoj kaj fruktoj. Respondoj aperos en sekvonta numero.




Rigardu tre atente la frazojn, kaj trovu, kaŝitan en ĉiu frazo, la nomon de **BESTO**, aŭ eble **BIRDO**, aŭ eble **FRUKTO**.



1. [Ekzemplo:] En Venecio Johano-Paŭlo vojaĝis en speciala papa gondolo.
2. Nun, en la maŭzoleo, pardonu vian mortan malamikon.
3. Pro cidro, meda rondo, kaj abunda biero, ni ĉiuj iĝis iom ebriaj!
4. La gloro estas tre bela, sed eble la vivo estas pli bela.
5. Ni legis amuzan libron de Claude Piron.
6. Ĉu vi deziras viziti Groenlandon ĉi-somere?
7. Ni ne povis dormi en la malvarma kabana nokto.
8. La belan monaĥon volis kisi ama katolika sinjorino.



9. Tradicia greka melodio eksonis el la malnova dometo.
10. Ŝi ludis tre bele fanton kaj tiel venkis en tiu kartludo.
11. Li parolis afrikanse, rolante kiel gvidanto en Pretorio.
12. La infanoj faris interesajn desegnojn, per sikomoraj semoj kaj diversaj etaj folioj.
13. Atentu viajn piedojn Ho ve, kaj nun mi devas ŝvabri koton de la kuireja planko. Stultulo!
14. La hungarino trikis puloveron por Kolomano Kalocsay.
15. Ne pelu tro da ŝafoj sur la vojon tiel rapide!
16. Estimu Sokraton kaj serĉu la veron sincere!
17. Testu dozadon centfoje en la laboratorio kaj notu la rezultojn detale.
18. Ni devas nun kuraci – doni oksigenon, digitalinon kaj aliajn rimedojn.
19. Li estas preta senlime vojaĝi por la misiaj laboroj.
20. Aperis rivala biografio de la prezidento, kaj oni diris, ke ĝi estas pli fidela.
21. Li devis dum du semajnoj loĝadi hotele, por observi la irojn kaj venojn de la suspektita spiono.
22. Nek aprobo nek malaprobo de la ĵurnaloj modifos lian konduton.
23. Imagi bonon ofte iom helpas nin iom fari bonon.
24. Johano perceptis, unue naze, nombron de tre fortaj francaj fromaĝoj.
25. Se trafe ni kopte rolos en la ekumena kongreso, ni kreos novan komprenon ĉe katolikoj kaj ortodoksuloj.



[El malnova ekzercaro por somerkurso ĉe Barlastono, Britio; dank' al Marjorie Boulton, kiu sendis ĝin al ni.]

Estimata Redaktora Moŝto:

Lastatempe oni puŝis sur la vizaĝon de la Ĉef-Ministro de Kanado torton el laktokremo. Tiu fiago estis, laŭ mia opinio, tre malĝentila. Evidentiĝas ke neniu havis sufiĉe da respekto por demandi de S-ro Chretiĉn kian torton li preferas.

Mi senspire atendas vian vidpunkton.

Sincere la via,

Kon-Fu Zita

Kara S-ro Zita,

Dankon pro la nova pensiga demando. La unua parto de via demando temas pri respekto. Junuloj ofte malrespektas la pliaĝulojn. Ili kutime volas tuj agi anstataŭ ol atendadi respektoplene kaj eble ignoritaj, kaj paciencon de ignoremuloj ili devas lerni. Oni nur esperu kaj certigu, ke ĉi tiu junulo lernas tiun lecionon kaj poste ne faros pli gravan eraron. Ĉu oni respektas aŭ malrespektas oficiulon kiel nacian ĉefministron estas politika demando kiun mi ne deziras trakti. Ankaŭ estas tre malfacile distingi inter la oficiulo kaj la homo. Pli ĝentile estus se la juna farinto puŝis torton sur la vizaĝon de la ĉefministro sed ne sur la vizaĝon de S-ro Chretiĉn. Kiel tion fari estas demando por politikaj filozofoj. Evidente la juna aktivulo kaptis la atenton de la tuta nacio, kaj restas necerte ĉu li povus kapti similan atenton, ekzemple, puŝante la torton sur la propran vizaĝon.

Parenteze, per tiu ago la farinto ankaŭ – por pruntepreni anglalingvan esprimon – puŝis ovaĵon sur la vizaĝon de la sekurec-prizorgistoj ĉirkaŭ la ĉefministro; tio estas, li montris ilin nepretaj, nekapablaj. Rezulto estas pli zorga atento al la sekureco de la ĉefministro, kiu eble savos lin estontece de pugno aŭ ŝtono aŭ io malpli ĝentila ol torto.

La cetero de via demando temas pri individuaj preferoj. Laŭ mia informo, ankoraŭ ne estas fakto pruvita ke neniu demandis de la ĉefministro kian torton li preferus. Efektive S-ro Chretiĉn nur diris ke li miris pri la nekutima maniero por oferti torton en tiu loko kaj ke li ne deziris tiom grandan porcion. Li menciis nek la guston nek la tipon de la torto. Ĝi estis la kutima ĉiutaga speco de sur-la vizaĝ-torto. Tial, oni ne intencis kaŭzi ĝenon per elekto de ofenda gusto.

Via, kun senlima pacienco,

Redaktoro de *Inter Ni*
bob.williamson@ns.sympatico.ca

[Redaktora rimarko: Mi invitas opiniojn de la legantaro pri ĉi tiu aŭ iu alia temo.]